

Pri la brazila imperiestro Petro la 2-a (3)

Petro la 2-a ĉiam havis la deziron ekkoni Eŭropon; li estis leginta multe pri la kontinento de siaj prauloj: historio, kulturo, scienco ktp., kaj estis lia revo ekkoni ĝin persone. Kiam, en 1871, lia filino Leopoldina mortis en Vieno, li havis la tristan oportunon vojaĝi tien. Li petis permeson al la brazila Parlamento fari la vojaĝon kaj deklaris sian filinon Isabel, kiu estis la heredantino de la trono, regentino dum sia foresto.

En Eŭropo li vojaĝis kun malmultaj akompanantoj kaj preskaŭ inkognite (uzante ne sian titolon kaj imperiestran nomon, sed sian familian nomon "Pedro de Alcântara"). Li vojaĝis al pluraj landoj (kaj vizitis ankaŭ la piramidoj en Egiptio), sed estas Francio, ĝiaj liberalaj idealoj, ĝia arto kaj kulturo, kiun li plej ŝatis.

La vojaĝo donis al li ankaŭ la oportunon ekkoni gravajn homojn: Charles Darwin, Friedrich Nietzsche kaj Richard Wagner (al kiu li donacis monon por la konstruado de ties fama teatro en Bayreuth). Aparte plaĉis al li la renkonto kun la granda franca verkisto Victor Hugo, kiun li vizitis kiel simpla homo kaj pri kiu li diris: "Estas li la vera imperiestro." La du viroj havis la samajn ideojn pri la homanaro kaj bonege komprenis sin.

Alia grava homo kiun Petro la 2-a renkontis estis la franca sciencisto Louis Pasteur. La du viroj iĝis amikoj kaj poste korespondis unu kun la alia. Petro la 2-a finance helpis la fondon de la Instituto Pasteur, kaj ekde tiam ekzistas rilatoj inter francaj kaj brazilaj sciencistoj. Esploristoj de la Instituto fondis samnoman instituton en Rio de Ĵaneiro.

En 1875 Petro la 2-a estis elektita al la franca Akademio de Sciencoj, pri kio li feliĉis kaj fieris, ĉar pli ol imperiestro li volis esti sciencisto kaj esti rekonata kiel tia.

Li daŭre interesiĝis pri sciencaj malkovroj kaj teknikaj inventoj. Dum vojaĝo al Usono li renkontis Graham Bell kaj Thomas Edison, ekkonis iliajn respektivajn inventojn, la telefonon kaj la inkandeskan lampon (ampolon) kaj instaligis ilin en Brazilo.

Kiel mi diris, li estis kontraŭ la sklavismo. Dum sia tuta vivo li luktis kontraŭ ĝi – vane, tamen almenaŭ li sukcesis en 1871 promulgi la "Leĝon de la Libera Ventro", laŭ kiu la infanoj de sklavoj estos liberaj. Kelkajn jarojn poste li promulgis la "Leĝon de la 60-jaraĝuloj", laŭ kiu sklavoj estos liberataj je la aĝo de 60 jaroj. Fine estis lia filino Isabel – kiel regentino, kiam li estis denove en Eŭropo pro sanproblemoj – kiu deklaris la abolon de sklavismo en 1888. Evidente li estis feliĉa, malgraŭ la diverstipaj problemoj kiuj estiĝis kaŭze de la abolo.

Tamen, post preskaŭ 50-jara regado, li estis tre laca, kaj dum solena balo en 1889 en Rio de Ĵaneiro li deklaris sian intencon abdiki favore al sia filino. Tio ne estis akceptita, kaj la 15-an de novembro samjare okazis puĉo de respublikanoj kiuj devigis lin deklari la Respublikon. Kelkaj konsilistoj sugestis, ke li laktu kontraŭ la respublikanoj, sed li ne volis civilan militon en Brazilo.

Petro la 2-a estis devigita foriri rapide kun sia familio kaj ekziliĝis en Eŭropo. Komence li akceptis loĝi en la portugala kastelo Queluz, kie i.a. lia patro estis mortinta. Post malmulte da tempo lia edzino mortis, kaj li preferis vivi modeste en hotelo en Parizo, kie li ricevis ankoraŭ plurajn intelektulojn kaj artistojn kaj mortis en decembro de 1891. La franca registaro organizis grandan solenan enterigon, en kiu partoprenis ĉirkaŭ 300.000 – parte gravaj – homoj.

En 1921 lia korpo estis transportita al Brazilo, kie enorma homamaso ricevis ĝin kaj kie ĝi estis enterigita – kune kun tiuj de lia edzino, lia filino kaj ties edzo – en la katedralo kiun li mem estis konstruiginta en Petropolo (Petrópolis).

Ĉi tie finiĝas mia resumo de la menciita dokumentfilmo. Evidente en la portugallingva Vikipedio ekzistas longega artikolo pri Petro la 2-a. El ĝi mi tradukas nur la jenajn frazojn:

La interesoj de Petro la 2-a estis diversaj, kaj inkluzivis antropologion, geografion, geologion, medicinon, juron, religiajn studojn, filozofion, pentrarton, skulptarton, teatron, muzikon, kemion, poezion kaj teknologion. [...] Lia pasio por lingvistiko igis lin dediĉi sian tutan vivon al studado de novaj lingvoj, tiel ke li parolis kaj skribis ne nur en la portugala, sed ankaŭ en la latina, franca, germana, angla, itala, hispana, greka, araba, hebrea, sanskrita, ĉina, provenca kaj tupia.

Strangas ke oni ne donas tiujn detalojn en la dokumentfilmo, kiu tamen ja estas plena de laŭdoj.